

Simpozio de ILEI, resumo de la referaĵo de Robert Phillipson
Subtenado de diverseco en lingvoj de klerigado

Universitatoj laboras sub premo. Liberecon en la elekto de esplorkampoj en universitatoj limigas registaroj kaj komercaj entreprenoj kiuj komisiis difinitajn esplorprojektojn; pli da prestiĝo oni aljuĝas al eldonaĵoj en la angla lingvo ol en aliaj (bibliometra histerio!); surmerkatigo tutmonda de universitatnivelaĵoj (kun eksporto de nur-anglalingvaj universitatejoj); la Bolonja procezo kiu kuntiras internaciigon kun klerigado nur anglalingva. La politiko de EU pledas por multlingveco, tamen la kutima praktiko en EU, ekzemple en la kampo de scienca esplorado, fortigas la anglan lingvon malavantaĝe al aliaj. Tial estas esence ke la universitatoj ellaboru institucian praktikon kiu efektive kuraĝigas multlingvecon, kaj kreu ekvilibron inter lingvoj naciaj kaj interaciaj, ĉefe sed definitive ne ekskluzive la angla. Kelkajn paŝojn tiudirekten prenis registaroj de la Nordiaj landoj. Kelkaj eldonaĵoj dokumentas kiel danaj universitatoj laŭiras la vojon al dulingvismo. La Universitato de Kopenhago ĉefrolas en la agnoskado ke gravas ne nur kontrolo de kvalito, sed ankaŭ la bezono esplori pri “paralela kompetento”.

Vidu la respondon de Robert Phillipson al Humphrey Tonkin pri la imperio de la angla lingvo en scienca esplorado: Critical Inquiry in Language Studies, 8/1, 117-124, nun elŝuteblan de
<http://ilei.info/konferenco/2011/Tonkin%20Phillipson%20response.pdf>

Aliaj artikoloj de Robert Phillipson estas elŝuteblaj ĉe
www.cbs.dk/staff/phillipson